

P. 11



JEN BULTENO  
1/1970



GRAVA ANONCO

ĈI TIU ESTAS LA LASTA NUMERO DE LA JEN-  
BULTENO

KIU ALVENOS AL VI, SE VI NE MEMBRIĜOS EN  
JEN, AŬ ABONOS LA JEN-BULTENON, POR 1970.  
POR PLU RICEVADI LA TUTKONTINENTAN VOĈON  
DE LA ESPERANTISTA JUNULARO, FARU JENE:

1) Plenigu la abonilon ĉi-dekstre (+)  
kaj sendu ĝin kun la indikita pago al:  
S-ino Peggy Linker, Kasisto de E.L.N.A.  
1414 Monroe Street  
Walla Walla, Washington 99362.

2) Se vi havas malpli ol 30 jaroj,  
alia (kaj pli bona) metodo estas membriĝi  
en E.L.N.A.-JEN. Vi ricevos la *JEN-*  
*Bultenon* kaj plurajn aliajn bonegaĵojn.  
Vi trovos membriĝilon en ĉi tiu numero.

(Se vi jam remembriĝis aŭ abonis, vi ne  
devis legi ĉi tiun paĝon.)

Al: S-ino Peggy Linker, Kasisto de E.L.N.A.  
1414 Monroe St., Walla Walla WA 99362

Bonvolu abonigi min al la *JEN-Bulteno* por 1970.

Mi sendas ĉi-kune:

\$2.00 (ordinara abonprezo)

\$1.50 (speciala abonprezo nur por ELNA-anoj)

Nomo .....

Adreso .....

(anoncetoj)

Ĉu vi deziras senpage vojaĝi al Japanujo? Se vi aĝas malpli ol ĉ. 25 jaroj kaj povas bone paroli la lingvon kiun vi nun legas, skribu pri la ebleco gajni senpagan vojaĝon al Japanujo. Informojn donas: EIC, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010.

Ĉu vi estas propagandema? Se jes, vi povas ricevi anglalingvan sonbendon (radi-kvalitan) de intervjuo pri Esperanto. La intervjuon faris Mario Pei, ĉe disaŭdigejo WNYC en Novjorko. Informiĝu ĉe Mark Mandel, 890 West End Avenue, New York NY 10025.

Ĉu vi ŝatas la magion? Se jes, ne forgesu reaboni la *JEN-Bultenon*: "la gazeto kiu aperas kaj malaperas".

Ĉu vi estas "rektulo"? Do hipiĝu. Metu Hipinglon sur vian ĉemizon kaj Hipmarkojn sur viajn korespondaĵojn. Unu Hipinglo 25¢. Tridek malsamaj Hipmarkoj 50¢, 10 folioj (300 markoj) \$3,00. Iomete neperfektaĵoj Hipmarkoj duonprezaj (25¢ kaj \$1,50). Menu de International Language Society, 1212 East 59th Street, Chicago IL 60637.

JEN-BULTENO

1/1970

Redaktis:  
Robert N. Rothenmeyer

Materialon por  
aperigo sendu al:

Robert N. Rothenmeyer  
281 Dwight St. Ext.  
Springfield, Mass.  
01105

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Internacia lingvo bezonas internacian organizon. Universala Esperanto-Asocio fondiĝis en 1908 por plenumi tiun celon. Hodiaŭ UEA okupas modernajn oficejojn en la centro de la internacia havenurbo Rotterdam, kaj de tie ĝi prizorgas la interesojn de pli ol tridek mil membroj en sesdeko da landoj. Ĝi eldonas Jarlibron, du monatajn revuojn, kaj de tempo al tempo librojn kaj diskojn. Ĝi organizas kongresojn kaj funkciigas reton de lokaj reprezentantoj.

La junulara sekcio de UEA estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kun dekdu mil membroj, propra revuo, kaj amaso da diversaj servoj kaj agadoj--inkluzive ĉiujaran kongreson. JEN estas la usona sekcio de TEJO.

Petu informojn pri UEA/TEJO ĉe Armin F. Doneis, usona reprezentanto de UEA, Box 105, Pharr, Texas 78577.

---

---

Sur la kovropago: ELNA kaj JEN festas sian unuigon.

ESPERANTISTO DE LA MONATO

JEN-INTERVJUU: Jose Vazquez  
interparolo kun juna Esperanto-parolanto

Jose estis intervjuita ĉe la ELNA-Kongreso en North Adams, Mass., kie li estis sendube la plej helpema kaj kompleza ĉeestanto. Li allogis atenton per Esperanto-pinglo kiun li portis, kun la vortoj, "Knabinoj jesas al neantoj."

JEN: Ĉu vi povas indiki al niaj legantoj ion pri via historio?

Jose: Mi nun loĝas en West Orange, N.J., kvankam mi naskiĝis en Kubo en 1945. En 1960 mia patro sendis min el Kubo ĉar la politika situacio estis minaca. Miaj gepatroj sekvis post jaro. Mi diplomiĝis kiel inĝeniero. Mi ne estas certa kion mi faros en la estonteco, sed eble mi fariĝos komputilisto. Sed mi devas unue venki en la batalo kontraŭ mia soldatiga komitato. Por ĉeesti kunsidon de tiu grupo, mi devas vojaĝi al Kalifornio baldaŭ, ĉar tie mi registris.

JEN: Ĉu vi deziras resti en via nova hejmlando?

Jose: Plaĉas al mi vivi en ĉi tiu lando, sed mi volas iam reiri al Kubo, se nur je vizito. Mi nun ne intencas fariĝi Uson-civitano.

JEN: Kiel vi eksciis pri Esperanto?

Jose: En 1963 mi legis artikolon en "Playboy" en kiu oni menciis la vorton "Esperanto." Mi fariĝis scivolema kaj iris al biblioteko por eltrovi kio "Esperanto" estas.

JEN: Kial vi lernis ĝin?

Jose: Precipe ĉar ĝia internacieco allogis min. Ĉu vi havas pli da fatraso?

JEN: Jes. Kion vi faris per Esperanto?

Jose: Mi vizitas ĉi tiun kunvenon kaj iam laboris ĉe la Esperanto-Infomcentro en New York. Mi disdonis informfoliojn pri Esperanto. Nun mi planas sendi leteron al ĉiu universitato en New Jersey por demandi ĉu ili akceptos Esperanto-kreditojn de tiuj kiuj volas enuniversitatiĝi. Al ĉiu kiu respondos nee mi petos la kialon. Mi ankaŭ volonte diskutos kun tiuj universitataj administristoj la aferon pri akcepto de Esperanto.

\* \* \* \* \*

#### LA GOLFETA ESPERANTISTO

La "Golfeta Esperantisto" estas gazeto de SFERIDO, junulara sekcio de SFERO (la San-Francisco-Esperanto-Regiona Organizaĵo). Ĝi estas mallonga multobligita eldonaĵo verkata de junuloj de Norda Kalifornio pri temoj koncerne al ĉiuj junaj Esperantistoj. Mendu ĝin de la redaktisto Denis LeCam, 101 Kensington Rd., Kensington, Ca. 94707. Kvinnumera abono kostas 50 cendojn, 11-numera abono unu dolaron.

\*  
AL KROKODILANTOJ

Mark Mandel

Ni parolu Esperante!  
Ĉar kunveni estus vante  
se, en niaj verdkunsidoj,  
stelkunrajdoj, E-kunridoj,  
kunparolus ni per tiu  
lingvo, kiun el ni ĉiu  
uzas en la laborejo,  
strato, hejmo, amorejo,  
forlasante la okazon  
turni nin en stel-emfazon,  
tion ne utiligante  
kion ni, aŭ elegante,  
aŭ haltante, aŭ eĉ fuŝe,  
rare povas uzi buŝe.  
Ĉion kune do farante,  
ni parolu Esperante!

\*

tiuj, kiuj parolas nacilingve  
ĉe E/kunvenoj.



LA KUNTEKSTO DE IES PROTESTADO

Ellen A. Lewis

Sokrato povus treege facile eskapi el Ateno kaj ne trinki la cikuton. Tamen, li respondis al siaj amikoj, ke elektinte vivi en Ateno, li akceptis la leĝojn de tiu urbo. Tiel, se li malobeis la leĝon, kaj se oni kondamnis lin, eĉ nejuste, li devas akcepti la punon, eĉ la morton. Thomas More, ankaŭ, povus (kune kun la Episkopo John Fisher) eskapi el la ekzekuto se li akceptus la juron de la Heredrajto, deklarante ke la Reĝo de Anglujo estas la ĉefo de la Angla Eklezio--kaj ke Anne Boleyn estas la Reĝino kaj laŭleĝa edzino de Henry VIII. Sed li rifuzis fari tiel, kaj oni senkapigis lin. Ĉe la eŝafodo li diris, ke li mortas "bona servisto de la Reĝo sed unue de Dio." Tamen, More neniam ĉesis emfazi, ke oni devas esti lojala al la reĝo. Alivorte, Sokrato kaj More--kaj multaj aliaj--faris malobeagon kaj suferis la punon en la kunteksto de lojaleco kaj obeado.

Sokrato kaj Thomas More estis martiroj. Tiu greka vorto "martiro" signifas atestanto. Estis, kaj estas, en la mondo milionoj da martiroj, kiuj mortas pro religio, politiko, rajto al esprimo, ktp. Laŭ mia opinio, tamen, oni ne devas morti por esti (konata aŭ nekonata) martiro. Thoreau pasigis nur unu nokton en malliberejo; kaj ŝajnis al li, ke li estas libera homo dum la eksteruloj ne tia estas. Ofte la prezo estas kalumnio. La leganto certe povas pensi pri la aliaj punoj.

Sed nuntempe, kiam miloj da homoj protestas kontraŭ la vjetnama milito, la rasismo, la malriĉegeco, kaj aliaj ekzemploj de maljusteco, oni memoru Sokraton, Sanktan Thomas More, Mahatma Gandhi, Martin Luther King, kaj la nenombreblajn aliajn, kaj oni demandu al si: kio estas la lojaleca kaj obeeca kunteksto de mia protestado?

\* \* \* \* \*

### POŜ-MAPARO DE LA MONDO

Poŝ-maparo de la mondo en Esperanto estas preparata de Ĉeĥoslovaka firmao. Ĝi enhavas 41 kolorajn mapojn kun multaj pli detalaj mapoj, 82 paĝojn de informa teksto en Esperanto, kaj broŝuritan formaton. La nomoj estos plejparte Esperantlingvaj. La maparo aperos en 1970; ĝia antaŭvidata kosto estas \$2.50. Pli detale informos:

Kartografickê Nakladatelství  
Praha 7, Kostelni 42  
Ĉeĥoslovakujo

\* \* \* \* \*

"Ekzerco estas tre saniga! Ĝi mortigas bakteriojn."

"Nu! Do, mi ordone ekzercigos miajn bakteriojn."

"Ĉu mi vin renkontis iam en Toledo?"

"Neniam. Mi neniam tie estis."

"Nek mi. Eble estis du aliuloj."

DEZIRAS KORESPONDI

Hungarujo: Du fratinoj deziras korespondi pri lingvoj, muziko (klasika kaj moderna), gramofondiskoĵ, poŝtmarkoĵ, fotografado, filmoĵ, geografio, literaturo, historio, kaj biologio:  
Judit Bellér (16 jara)  
Ildiko Bellér  
Nemetvölgyi str. 78/a  
Budapest, XII, Hungarujo.

Rumanujo:

Instruisto 29-jara deziras korespondi:  
S-ro Elek Kallos  
Tg. Mures  
Str. Braşovului 7 op. 38, Rumanujo.

Kaj tri lernantinoĵ:  
Katalin Kovács (19-jara)  
Bezidu Neu 20  
jud. Mures, Rumanujo

Irén Magyarí (19-jara)  
Fintínele  
Str. Mare 499  
jud. Mares, Rumanujo

Eva Ujfalvi (16-jara)  
Sîng de Pădure  
Str. Dózsa 44  
jed. Mures, Rumanujo

Ĉeĥoslovakujo:

Instruistino, 23-jara, estas interesata de muziko kaj sporto,  
kaj deziras korespondi:

Libuše Hájková  
Palašska Bystřice 316  
okres Vsetin, Ĉeĥoslovakujo.

\* \* \* \* \*

SENPAĜA VOJAĜO AL LA MONTJOJ DE VERMONT ! ! !!!!! ! !

Se vi estas ino kaj bone prononcas Esperanton, vi povas eble ricevi senpagan vojaĝon al la belegaj montoj de Vermont dum la venonta fru-printempo. Vi devos nur partopreni sonbendan registradon dum 2-3 tagoj kiam vi estos tie. Per la farotaj sonbendoj, miloj da homoj lernos Esperanton tra la tuta mondo. Ĉu interese? Do skribu al:

ESPERANTIC STUDIES FOUNDATION  
6451 Barnaby Street, N. W.  
Washington, D. C. 20015

\* \* \* \* \*

Juĝisto: "Vi diris, Sinjorino, ke vi ja mortigis vian edzon per tranĉilo; sed la mortenketisto diris, ke vi pikegis la edzon kvincentfoje. Kial?"

Murdisto: "Mi ne povis ĉesigi la elektran tranĉilon."

"Ju pli da legistoj, des pli longa la afero."

"Ju pli da kuracistoj, des malpli longa la afero."

KOREA JUNULARO PETAS HELPON

Jam antaŭ pluraj jaroj fondiĝis en Suda Koreo la t.n. Korea Esperanto-Junularo. Ĝi estas nun sekcio de TEJO kun ducento da membroj (pli ol JEN!). Tamen, la junaj koreaj Esperanto-parolantoj frontas specialajn problemojn ĉar ili ne rajtas sendi monon eksterlanden. Pro tio, ili nur tre malfacile povas akiri esperantaĵojn. Mankas al ili vortaroj, legolibroj, literaturo, gazetoj, kaj ĉiuj aliaj materialoj, kiujn ni akceptas kiel ĉiutagajn. La studenta kaj junulara Esperanto-klubo en Gwanju faris specialan peton, ke oni sendu tien ĉiuspecajn esperantaĵojn, por la kluba biblioteko kaj klubkunvenoj.

La adreso estas: ĉe s-ro Jeong Jong-Hyu, P. O. Box 106, Gwangju, Koreo.

\* \* \* \* \*

PROGRAMO POR INFORMADO

Esperanto-organizaĵoj rimarku ke gvidlibreto estas akirebla por preciza informado. La Kompanio Sperry kaj Hutchinson (verdmarkoj S&H) antaŭnelonge eldonis 24-paĝan libreton kun titolo "Publicity Handbook-- A Guide for Publicity Chairmen." Ĝi enhavas ĉiujn bazajn faktojn pri efikaj publik-informado kaj traktado. Inkluzivita estas informo pri utiligo de ĵurnaloj kaj aliaj komunikiloj. Ĉi tiu libreto estas akirebla senkoste de respondeculo pri informado de organizita klubo. Por akiri ekzempleron por via Esperanto-grupo, sendu skribitan peton kun via nomo, adreso, kaj nomo de via klubo al: The Sperry Hutchinson Co., Consumer Relations, 3003 East Kemper Road, Cincinnati, Ohio 45241.

PETO EL SVEDUJO

"Programoj por Eksterlando" de la sveda radio celas konigi eksterlandanojn pri Svedujo. Nun dissendata en ses fremdaj lingvoj, antaŭ 20 jaroj la radio ankaŭ uzis Esperanton. Estas tempo re-enkonduki Esperanton en la svedan radion, kiu cetere estas bone aŭdebla en la mondo ekster la svedaj limoj. Svedaj Esperantistoj petas al vi skribi al sveda radio por proponi la enkondukon de Esperanto en la programojn por eksterlando. Oni ankaŭ menciis la temojn rilate la sveda vivo (politiko, teatro, muziko, sporto) pri kiu oni disaŭdigu.

Skribu al:

Sveriges Radio, Utlandsprogrammet, STOCKHOLM

Ankaŭ, oni povas peti senkoston novan informilon "Faktoj pri Svedujo" per rekta skribo al:

Sveda Instituto  
Box 7072  
103 82 Stockholm, Svedujo

\* \* \* \* \*

"La transiro de la nuntempa polilingvisma ĥaoso en la internaciaj rilatoj al monolingvismo--kio ja estas la alpreno de Esperanto--signifas formorton de jarcentaj rutinoj kaj privilegioj. En tiu senco Esperanto povas esti konsiderata lingvorevolucio. Estas normale, ke kontraŭ ĝi koalicias ĉiuj malnovaj interesoj, kiuj akurate plektas ĉirkaŭ ĝi komploton de silento."

Gian Carlo Fighiera, el Esperanto.

A B O N U   L A   J U N U L A R A N   R E V U O N

K O N T A K T O

K O N T R A Ŭ   N U R   \$ 1 . 5 0 !

Normale tiu ĉi luksa kvaronjara revuo kosta \$2.50 por unujara abono.

Sed por plimultigi ĝian legantaron, kaj por certigi, ke ĉiu juna Esperanto-parolanto havu la eblecon aboni ĝin, oni reduktis la abonkotizon!

Se vi naskiĝis en la jaro 1945 aŭ pli poste, vi rajtas pagi la reduktitan kotizon. Pli aĝaj personoj devas pagi \$2.50.

Kontakto estas plene internacia gazeto. Ĝi estas redaktata en Pollando, eldonata en Nederlando, kaj legata en tridek landoj. Ĝi pritraktas en taŭga formo la interesojn, problemojn kaj amuzojn de la internacia junularo. Kvankam ĝi precipe pritraktas neesperantistajn temojn, ek de 1970 ĝi ankaŭ enhavos parton dediĉitan al la Esperanto-junularo.

Plenigu la aliĝilon dorsflanke!

A B O N I L O

Al: Humphrey Tonkin, peranto de Kontakto, 2131 Tryon Street,  
Philadelphia, Pa. 19146.

Mi deziras aboni la revuon Kontakto kaj ĉi-kune alsendas monon /  
poŝtmarkojn / ĉekon (forstreku la netaŭgajn) por la jena sumo:

\$1.50 (mi naskiĝis en 1945 aŭ poste)

\$2.50

Nomo: \_\_\_\_\_ Naskiĝjaro: \_\_\_\_\_


Adreso: \_\_\_\_\_

Zip: \_\_\_\_\_

Ĉekojn pagigu al Humphrey Tonkin aŭ al Universala Esperanto-Asocio.

Kontakto estas eldonata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo,  
Junulara Sekcio de Universala Esperanto-Asocio.





La Praktiko/red F Luin  
Mygdalsvägen 123  
S-13500 Tyresö, Svedio

PR700115-S

Al kunlaborantoj de la Praktiko

Por kelkaj venontaj numeroj de la Praktiko mi ŝatus enkonduki iom novan labor-  
metodon. Mi satis dediĉi kelkajn numerojn al specialaj temoj, kiuj aperu apud  
la normalaj eroj de la Praktiko. Tian enhavon povus havi la koncernaj numeroj:

Aprilo: "INFANOJ"

Jam havas artikolon pri infanoj en malriĉaj landoj, artikolon "Ĉu in-  
strui legadon al trijarulo?" kaj rakonton de A.Abonyi-Nagy "La flugil-  
drako". Dezirindaj estus artikoloj pri:

Infanludoj

La nenaskita infano - de kuracisto.

Infanlibroj en esperanto

Lulkantoj - el plej eble multaj landoj

kaj pentraĵoj de infanoj.

Majo: "MARO"

Havas en preparo artikolon pri grandskala fiŝkaptado. Dezirindaj:

Maraj birdoj

Kulturado de perloj

Fiŝkaptisto kiun mi konas

"La signifo de la maro por navigado" (amuza)

Subakvaj sportoj, surakvaj ankaŭ

La koralo

Artikolo pri fiŝproteino kaj ĝia signifo

La ekezkisto de la maro

Junio: "LERNEJO KAJ EDUKADO" (pro la Internacia Jaro por Edukado 1970)

La artikoloj povus temi pri:

Vivo de instruisto (aŭ lerneĵano) - el diversaj landoj

Edukelspezoj en la mondo

La signifo de JA Komensky (Comenius)

Ĉu kundecidrajto en la lernejo?

Kiel eduki sian edz(in)on - amuza

Edukado de handikapito (blindulo, surdulo ks)

Tio ĉi estas nur proponoj. Se vi povas sugesti ion alian, bonvolu fari tion. Se iu el la supraj temoj estas alloga al vi, bonvolu kontribui. Se eblas, bonvolu proponi artikolon antaŭ ol vi verkas ĝin, por eviti ke du verku la saman. Mi satus krome ricevi de vi fotografiaĵojn kaj desegnaĵojn. Humuraj artikoloj pri la supraj temoj ankaŭ taŭgas.

Ĝenerale mi ŝatus, ke viaj artikoloj ne estas teoriaj, sed ke ili pritraktas verajn homojn kiujn vi konas aŭ pri kiuj vi aŭdis aŭ legis - do infanojn, rekte, homojn ĉe kaj sur la maro, lernantojn kaj instruistojn. La teoriaĵoj eventuale respreguligu en la vortoj aŭ agoj de la homoj.

La septembra numero estos kongresa, kiel en la antaŭaj jaroj. Mi volonte ekscius, kiuj el vi vizitos Vienon (UK), Graz-on (IJK), Aŭgsburgon (SAT-K) k.c. kaj pretus kontribui. Ankaŭ por tiu numero mi preferus havi artikolojn pri la homoj en la kongresoj, apud la artikoloj pri la oficiala programo. Kaj bildojn, bildojn... Ĉu vi opinias tian raportadon alloga?

Limdato por la aprila numero: 1-a de marto

maja 1-a de aprilo

junia 1-a de majo

Kun sinceraj salutoj

*Franco Linn*

LETEROJ AL LA REDAKTORO

Estimata sinjoro redaktoro,

Mi estas studento komencanta ĉijare studi la anglan kaj svedan lingvojn ĉe la Praha Universitato de Karel.

En nia lando estas pro transpagaĵaj problemoj tre malfacile akiri bezonatajn lernolibrojn kaj vortarojn el eksterlando. Eble iu usona samideano volus interŝanĝe ricevadi esperantaĵojn, anglalingvajn sciencajn aŭ artajn librojn eldonitajn ĉe ni aŭ gramofon-diskojn aŭ ion alian laŭ interkonsento. Se vi afable povus publikigi mian anoncon, mi plezure pagos la valoron per esperantaĵoj aŭ alimaniere laŭ viaj instrukcioj. Anticipe dankas al vi,

Ivo Zelezny  
Vrchlického 41  
Praha 5, Ĉeĥoslovakujo

Al la Redaktoro, Jen Bulteno:

Iam en la pasinteco mi sufiĉe bone sciis kiel uzi la participojn en Esperanto, rilate al la "-ata-ita" afero. Pli poste mi akiris intereson en la studo de la verkaĵoj de diversaj aŭtoroj kiuj skribis pli-malpli pri tio.

Nun, post sufiĉe da studo, mi rememoras pri la fabelo de la miriapodo kiu havis mil kruojn kaj tre bone povis promeni tien kaj reen sen eĉ la plej malgranda malfacileco. Sed, iun tagon, kiam brilis hele la suno kaj la tuta mondo kuŝis en varmeco kaj plezuro, amiko de la miriapodo demandis: "Mi havas nur kvar piedojn kaj spite tion mi iufoje ne povas tre bone funkciigi la piedaron; mi volas scii kiel vi povas efike promeni kiam vi devas gvidi la agojn de mil piedoj." Ĉi tio

multe pensigis la mirapodon, kaj ŝi pensadis pri la afero dum tuta tago. Poste ŝi decidis denove provi sian kapablecon promeni kiel antaŭe sed nun ŝi nur falis en sulkon. La kruroj kaj piedoj senfine intermiksiĝis kaj nur post multe da tagoj ŝi povis denove fari kiel kutime rilate al la promenado.

Mi opinias ke la "-ata-ita"-afero estas simila. Ĝi estas interesa sed ne tre utila por la ĉiutaga uzado. Certe, mi opinias ke la angle-parolantoj ne havas multe da malfacilo en la uzo de Esperanto-verboj-----sed! mi povas esti malprava!

Kore,  
L. A. Ware, Iowa

Al la Redaktoro de la JEN-Bulteno.

Estimata Samideano:

Permesu al mi respondi al la artikolo pri la kaŭzo de la ribelaj studentoj en la JEN-Bulteno 1/1969.

La kaŭzoj, kiujn vi menciis, estas ĉiuj korektaj, sed via emfazo estas maltrafa.

Laŭ mia opinio nia milito kontraŭ la popola de Vjetnamo estas certe unu el la ĉefkaŭzoj de la studenta protestado. La deviga soldatigo de niaj junuloj por tiu ĉi malmorala milito incitas grandan nombrn de niaj studentoj, kiuj ankaŭ malaprobas la fakton, ke multaj el niaj universitatoj estas uzataj flanke de la militistaj aŭtoritatoj kiel eksperimentejoj por militistaj bezonoj.

Kelkaj el niaj universitatoj estas ne plu ĉefe lernejoj sed instruejoj por militistaj specialistoj. Kontraŭ tio la studentoj protestas.

Sed ne nur la "Pentagono" (la Usona Departamento de Defendo), sed ankaŭ multaj el niaj grandaj industrioj uzas (aŭ misuzas) la universitatojn kiel siajn eksperimentaĵojn kaj instruejojn. Kaj tiuj industrioj kaj la "Pentagono" "pagas" por tiuj ĉi specialaj servoj per grandaj donacoj, tiamaniere dependigante la universitatojn je sia subteno.

Kaj el tiuj fontoj kelkaj el la professoroj ricevas tiujn altajn salajrojn, pri kiuj vi parolis. Tiuj profesoroj kompreneble pil kaj pli iĝas servantoj de la industria kaj militistaj organizoj, kiuj subtenas la eksperimentojn kaj specialajn studojn. Do ni povas kompreni, ke ili ne plu havas tempon aŭ emon instrui junulojn; la studento ofte nur interesas ilin, se li estas uzebla por iliaj specialaj studadoj aŭ eksperimentoj.

Sed se vi pensas, ke la profesoroj ĝenerale estas tiel alte pagitaj aŭ ke ili havas tiel gravan influon pri la konduko de la universitato, vi tre eraras.

Multaj el niaj universitatoj estas nun mastrumataj de estraro de direktoroj (kiuj plejparte estas ankaŭ direktoroj de grandaj bankoj aŭ industrioj) kvazaŭ ili estus kapitalistaj entreprenoj, ne kiel lernejoj. Tio estas alia kaŭzo de multaj el la studentaj protestoj, ĉar multaj studentoj postulas, ke iliaj universitatoj ne servu ekskluzive alla industrioj kaj militistoj, sed antaŭ ĉio al la studentoj kaj al la komunumoj, kiuj ĉirkaŭas la universitatojn. Ili deziras, ke iliaj altrangaj lernejoj interesiĝu pri la problemoj de la urboj, de la minoritatoj, de ĝenerala instruado, de popola sano kaj progreso, unuvorte pri la problemoj de la socio ĝenerale.

Vi prave diris--laŭ citaĵo de Jencks kaj Riesman--ke granda nombro el la plej vekaj studentoj vidas, ke la universitato ne plenumas ĝian promeson, ĉar ĝi ne donas al la junulo la okazon evolui al kompleta homa kaj socia estaĵo, sed nur uzas lin kiel ilon por la bono de la industrioj kaj militistoj. Kaj estas speciale tiu ĉi ekkompreno kiu igis la studenton ribeli.

Kun samideanaj salutoj,  
Karl Nell.

\* \* \* \* \*

DOING A TRANSLATING JOB for your local club? Here are a few hints.

Type clearly and neatly. Nothing puts off a local newspaper editor, or broadcaster, so much as dirty pieces of paper amateurishly typed.

Avoid misspellings. If you are unsure of a word, look it up in a decent dictionary. Spelling may seem very trivial, but bad spelling will convince your reader that you are not worth paying attention to.

Watch out for foreign terms. Don't use "i.e." where you mean "e.g." or talk about "non sequitors" where you mean "non sequiturs." And avoid Esperanto words in English texts. Universala Esperanto-Asocio is Universal Esperanto Association in an English text. If you announce to a newspaper editor that UEA has 3500 delegitoj, he may be excused for not understanding that they are local representatives. Avoid the word samideano under all circumstances.

Above all, avoid mistranslations. Don't carry Esperanto terms over into English. Here is a short list of often mistranslated words:

ARANĜO. Seldom arrangement, generally event or program.  
GAZETO. Not gazette, but magazine.  
JURNALO. Not journal, but newspaper.  
KONGRESO. Either congress or convention, but not both in the same text.  
KONGRESANO. Not congressist or congresser but congress/convention member,  
or congress/convention delegate.  
LABORPLANO. Not labor plan or work plan, but plan of work or program  
of future activities.  
NOVELO. Not novel, but short story.  
PRESEERARO. Not press error, but printer's error or typographical error.  
REPRESI. Not to repress but to reprint.  
REVUO. Not revue, but review or illustrated magazine or glossy  
magazine.  
ROMANO. Not romance, but novel.

Finally, don't translate too literally. A good translation is a translation that doesn't read like a translation. Make your prose fluent, easy to read, pleasant, and clear.

H.T.

\* \* \* \* \*

Virino falis el fenestro en rubujon. Maljuna eksterlandano ŝin vidis kaj diris, "Usonanoj malŝparas tromulton. Jen tiu virino dum dek pli da jaroj estus uzebla."



1000000000

1000000000  
1000000000  
1000000000  
1000000000


1000000000  
1000000000  
1000000000  
1000000000

1000000000

1000000000

1000000000

International Language Society  
University of Chicago  
1212 East 59th Street  
Chicago, Illinois 60637



Address Correction Requested

DATED MATERIAL

Homo ingenuus  
discit linguam  
Latinam rapida  
et facile

